

SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN LA ESPERO

Juli—Aug. 1945

33 årg. Nr 7-8

ORGAN FÖR SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET

Nästa Nummer

av Espero blir nr 9 dvs. det blir vårt septembernummer och det är avsett att komma ut i god tid till Esperanto-veckan. Vi kunna taga emot bidrag till den 25 augusti, och behöva ej påpeka att denna gång gäller det artiklar på svenska, lämpliga för den propaganda, vari vårt septembernummer är avsett att vara ett led. **Red.**

Invito al aktiva kunlaboro.

Iom post iom la estraro de SEF turnos sin al la esperantistoj, proponante diversspecan aktivan kunlaboron. Por la aŭtuna propagando en tiu ĉi jaro ni bezonas artikolojn por la gazetaro enlanda. Tiuj artikoloj devas esti esence fortaj el propaganda vidpunkto. Tamen devas esti nur reala, prudenta kaj por granda publiko tre alloga propagando, montrante la praktikan uzeblecon de Esperanto en la postmilita mondo. Sed samtempe oni devas doni sufiĉan spacon al la bela, interfratiga ideo de nia lingvo.

Inter la svedaj esperantistoj estas kelkaj, kiuj ĝis nun ofte prezentis tre valorajn artikolojn. Kun ili la estraro de SEF volas entrepreni efektivan kunlaboron. Sed estas ankaŭ multaj, kiuj interne de si portas bonajn ideojn tre sugestajn por formi valoran materialon propagandan. Vi estas do ĉiuj tre bonvenaj! Fortaj argumentoj estas ĉiam tre necesaj en nia propagandado. **Ĝuste** vi povas krei tiun valoran helpilon, kiun ni urĝe bezonas, ĉar vi post multjara aktiveco en la esperantista movado kolektis al vi grandan fondon tiurilate.

Ĉiu kunhelpu en la poresperanta laboro! Tuj ekskribu (svedlingve) vian kontribuajon, kiun la estraro danke akceptos. Adresu al Sveda Esperanto-Federacio, Tegelbacken, Stockholm, kaj nepre sendu antaŭ la 15:a de aŭgusto.

Vi kaj mi, kune ni fosu nian sulkon!

Ke la katastrofo instruu nin.

Sub la titolo "La kazo Hitler kaj la estonto" dro Mauritz Enander skribas en la gazeto "Interpola Kunlaboro" inter alie:

Ke la estonto de la mondo en alta grado dependas de tio ke la popoloj en la demokrataj landoj pense enpenetras tiujn aferojn kaj vere provas kompreni, kiujn fortojn oni devas majstri por malhelpi ripeton de la homa mizero dum la lasta jardeko.

La verkisto daŭrigas:

Antaŭ ĉiuj atestoj kiujn oni nun aperigas abunde pri Hitler kiel homo, militisto kaj ŝtatesto, oni devas demandi al si kiel tia persono povis atingi tian potencpozicion. Se racia ekzamenado pri liaj kvalifikoj estus farita li evidente estus restinta je sia rango kiel vickaporalo. En la konkurso kiu estas neapartigebla de la politika batalo en demokrata socio li eble estus povinta kolekti nombron da anoj kaj ricevi parlamentan mandaton. Eble li estus povinta fariĝi gvidanto de malgranda sen-signifa ekstrempartio. Tamen estas malfacilege imagi al si el demokrataj elektoj devenantan ŝtatregistaron kie li kaj lia kunularo povus direkti la tonon. La manko de firma demokrata ordo kaj tradicio donis la eblecojn.

De tiu manko dependas ke terurregado povis esti kreata kie oni sen menciindaj ĝenoj povis prepari la plej danĝeran atentaton kiu minacis la okcidentan kulturon dum tre longa tempo. Estas instrue en tiu rilato memori la starigon de la praprio de la modernaj diktatorŝtatoj, nome la rusa. Konate ja ankaŭ estas, ke dum la intermilita tempo germanaj militistoj kaj politikistoj kun granda intereso kaj profunda admiro studis la metodojn de la orienta diktatorŝtato kaj akiris spertojn, kiujn ili poste kun germana radikaleco adaptis kaj evoluigis por hejmujo.

Kiam oni kun tendenco eviti ripeton provas klarigi kiel ĉio povis okazi, estas saĝe ne fikse teni la koncepton pri certaj nacikarakteroj kiel originaj

kaj neŝanĝeblaj. La diktatoreca "transedukado" de la homoj montras ke popola karaktero povas esti ŝanĝata en certan direkton se oni uzas radikalajn kaj senindulgajn metodojn. Jam la fakto ke oni aludas la edukadon de la germana popolo en militeman direkton de antaŭ kelkaj jarcentoj kiam oni volas klarigi ĝian nacikarakteron montras ke oni ne kredas je la neŝanĝebleco de popola menso.

La unua kaj fundamenta afero kiam temas pri transformigo de koncepto kaj vivmaniero de popolo estas propagando.

Tio signifas en ĉitiu konekto unuflankan kaj senĉese agantan informadon en unu direkton. La necesa dorsflanko de la propagando estas la fermo de ĉiuj aliaj informaj fontoj. La forta radikigo de la diktatorŝtatoj en le popolopinio — kaj ĝi fakte ekzistas kaj en la rusa, germana kaj aliaj diktatorŝtatoj — en plej alta grado dependas de tio ke oni povas elbari informon pri la stato kaj pensmaniero en la cetera mondo.

Tipa estas sperto kiun certaj organizoj faris en Anglio kiam oni penis ricevi kunlaboron kun respondaj rusaj. Montriĝas ke tiuj lastaj kun plej granda pretemo disponigas informskribaĵojn pri siaj propraj rilatoj kaj sia propra laboro, sed aliflanke ne volas sciigi pri tio dirata el okcidento.

Informoj el ekstere estas baritaj ĉe la limo. Per tiuj metodoj montriĝis sufiĉe facile ĉe popolo inokuli unuflanke firman kredon je la bonegeco de la propra reĝimo kiel la supera, kaj aliflanke kun timo miksata konvinko pri la aĉeco kaj malico de la ekstermondo — oni nomu ĝin kapitalista aŭ judo-plutokrata. Ĉiuflanka informado inter la popolo estas la plej danĝera malamiko de la diktatoreco.

La potencpozicio de Hitler estis en plej alta grado konstruita sur la manko de demokratio kaj informado. Ke li poste sen moralaj aŭ intelektaj malakceloj uzis sian potencon estas aparta afero. Lian taktikon ebligis ne plej malmulte tio ke oni en Okcidento ne povis imagi politikon tute liberigitan de ĉiuj konceptoj pri honoro kaj justo. Por la estonto la demokrataj ŝtatistoj evidente devas lerni ne pensi tro alte pri siaj diktatoraj kolegoj.

Unu afero kiun oni ne povas sufiĉe substreki en parolo pri la diktatorŝtatoj estas ke tiuj fondas sian potencpozicion ĉe la popoloj ne plej malmulte sur trotaksado de la materiaj flankoj de la vivo. La germana laboristo, kiu sin kredis per la nova reĝimo sekurigita kontraŭ senlaboreco kaj garantiata certan vivnivelon, malpli atentis ke tio estis aĉetata je la prezo de la libereco kaj kundecidrajto en la socio.

Tiom longe kiom la reĝimo estis sukcesa la kritiko kontraŭ la metodoj estis pli kaj pli indiferentigita. Kaj iom post iom la manko je kritiko fariĝis akcepto kiu transiris al positiva aprobo.

El tio venas la terura sperto kiun oni faris pri germana indiferento antaŭ la malkaŝo de la koncentrejoj same kiel la fanatika batalo de la junaj knaboj kaj knabinoj por gardi la putran sistemon. Estas tempo de tiu speco, pri kiu sveda poeto parolas, kiam

"junula kor frostiĝas kaj sentas sen angoro ke el la mondo fuĝas la idealo de bonkoro".

Veiko Johannes.

(Daŭrigo)

Rakonto de Einar Wallquist. Trad. Hj. Dahlén.

Ĉiutage venis novaj grupoj. Samaj scenoj repetiĝis, sama aliigo higiena, sama revekiĝo el la letargio akompananta la penegojn.

La suĉinfanon, kiu trinkis akvon kun tritikogrioj, ni akceptis en la malsanulejon, kie li rapide saniĝis. Matene, tagmeze kaj vespere la patro venis por rigardi sian filon, ridetis kaj ĝojis pro la pliboniĝo. Jen la bubo estas lia tuta havaĵo. Iun tagon ni ricevis sciigon el Finnlando, ke la fratino de la viro povos akcepti kaj prizorgi la infanon. Patro kaj filo forvojaĝis. Kun kortuŝa mallerteco, sed kun amo tia, kian oni apenaŭ povus atendi ĉe tia altkreska fortegulo, li portis la kunligaĵon kun la infanon al la aŭtobuso. La lasta, kion mi vidis de li, estis varma rideto ĉe la ventmordita vizaĝo kaj distreca rigardo de liaj okuloj. Ĉu li rigardis antaŭen al la nekonata malproksimo aŭ returnen al la estinto, tion mi ne scias.

Sufiĉan multegon da vestoj oni donacis al la enloĝejo. La virinoj, maljunulinoj kaj knabinoj, ekhavis permeson elekti por si novajn vestojn el la kunmetitaj amasoj. Estis gaje observi iliajn amuzitajn vizaĝesprimojn kaj gajajn gestojn, kiam ili elprovis kaj diskutis, rifuzis kaj fine decidiĝis. Oni volis esti kiel eble plej eleganta, kiam oni ree vidiĝos hejme. La eterna virina deziro ornami sin ne malaperis dum la vagado. Cetero tie hejme en la trarabitaj regionoj kredeble ne multe restis da juoj kaj ŝtrumpoj. La buboj ŝajne estis kontentaj, se nur ne premas la ŝuoj kaj estas sentrua la malantaŭaĵo de la pantalono. Tamen mi rimarkis, ke unue malaperis la plej belaj bekĉapoj kaj la plej mikskoloraj kravatoj.

Certe ne estis nur la malegaleco rasa, kiu faris ke la animstato kaj ekvilibro de la unuopaj norvegoj, kiuj kunestis en la grupoj, estis aliaj ol ĉe la trankvilaj finnoj. La norvegoj estis nervaj kaj maltrankvilaj. Tamen ja estis tiel, ke la finnoj jam antaŭ longe ekiris de hejme kaj jam iel trasuferis. Al la norvegoj la katastrofo ankoraŭ estis tro proksima.

Plej ofte sola promenis mezaĝa viro kun mildaj trajtoj. La unuan tagon de maltrankvilo en Oslo li estas en la centro de la urbo sed rapidegis hejmen al la edzino en antaŭurba apartamento. Ŝi ne estis hejme. Li serĉis ŝin en la ĉirkaŭaĵo, en la vilaĝaro, en ĉiuj fuĝantaj aroj, kiujn li povis atingi. Li ne trovis ŝin. La milito premis lin ĉiam pli norden, fine trans la limon al ni. Li estis sinrega, sed en liaj okuloj kaŝiĝis malhela, senespera funebro. Mi volus kredi, ke hodiaŭ lia serĉado donis rezulton.

Juna edzino havis sian edzon en norda Norve-

Reĝimo sen bonaj idealoj, sen sento pri justeco, sen moralo — mallonge sen konscienco — jen la impresoj kiu restas de la miljara regno de Hitler. Malebligi ripeton de io simila apartenas al la plej urgaj taskoj por generacio, kiu tiom koste devis pagi siajn spertojn. Tradukis S a l e x.

LINGVA KOLONO.

Daŭrigi.

Permesu al mi aldoni kelkajn vortojn pri ĉi tiu afero kaŭze de la respondoj de Engholm kaj Szilágyi. Mi tute ne volas polemiki kun ili, sed en la komenca artikolo mi verŝajne ne esprimis min sufiĉe klare, kaj la malgranda spaco disponebla en la gazeto ja ne permesas troabundon da vortoj.

Unue kelkajn vortojn pri la esprimo "mi daŭrigas labori". Persone mi tute ne konsentas kun Engholm pri ĝia taŭgeco. Kompreneble la infinitivo ĉi tie funkcias kiel akuzativa objekto same kiel en "mi komencas labori". Tio estas tute klara. Sed laŭ mia opinio "daŭrigi" estas tro travidebla kunmetaĵo. Oni nepre sentas la kunmetajn partojn "daŭri" kaj "igi", kaj estas neeble dissolvi la vorton kaj diri "mi igas labori daŭri". Cetere laŭ mia scio ne ekzistas unu analoga kazo, kie oni uzas ig-verbon sekvatan de infinitivo, kaj nur per analogioj tia esprimo povus sankciiĝi.

Laŭ Engholm la lasta duono de lia respondo ne koncernas min, sed malgraŭ tio mi trovas, ke ĝi bonege apogas mian opinion. Kompreneble oni traduku laŭ senco. Tamen ŝajnas al mi, kvazaŭ ambaŭ respondintoj — konscie aŭ nekonscie — metus signon de egaleco inter netransitiva verbo kaj pasiva formo de transitiva verbo. Engholm diras, ke nur pedantoj dirus: "la programo estos daŭrigata post du minutoj". Kontraŭe, laŭ mia opinio, ĝuste pedantoj ne uzus pasivan formon anstataŭ netransitivan. Fakte ekzistas senca diferenco inter netransitiva kaj pasiva formo de verbo. Preskaŭ klasika ekzemplo pri tio estas la esprimoj "la pordo malfermiĝis (gick upp)" kaj "la pordo estis malfermata (de iu)". Kiam ni ne povas imagi ian aganton, ni uzas la netransitivan formon. Kompreneble en ĉi tiu kazo kun natura neceseco devas ekzisti ia aganto aŭ almenaŭ ia kaŭzo, sed ni ne scias pri ĝi, kaj nia nescio pri la kaŭzo sufiĉas por ke ni diru ke la pordo malfermiĝas per si mem sen ekstera influo. Sed troviĝas pli bonaj ekzemploj. Prenu ekz. la verbojn "komenci" kaj "fini". Egale bone oni povas diri "la leciono finiĝis" kaj "la leciono estas finita", sed en la

gujo, kiam la milito surprizis ŝin. Ŝi venis kune kun siaj du infanoj trans la montegaron por provi, vojaĝante tra Petsamo, serĉi lin ĉe la plej nordaj fjordoj, kie li kredeble restadis. Ŝi estis tute senhava, posedis nur infanan kredon je senlima helpemo de homoj. Eble tiu kredo tamen estis sufiĉe forta por forigi ĉiujn barojn kaj helpi ŝin kaj la infanojn sendifektaj al la viro tie norde. Mi ne aŭdis, ĉu ŝi atingis lin, sed ŝi estis tiom persista kaj energia, ke ne mirigus min, se ŝi tion sukcesis fari.

Orfa knabo kunestis en iu grupo. En la ekira konfuzo li perdis sian dekjaran fratinojn, por kiu li frumature sentis respondecon. Mi ne forgesos lian silentan ĝojon, la rideton kaj la brilajn okulojn, kiam ni povis diri al li, ke la fratino estas bone protektata de pastra familio sur la norvega flanko.

(Daŭrigo)

esprimo "la pluvo komenciĝis tagmeze kaj finiĝis ĉirkaŭ la tria horo" estas absolute neeble imagi aganton, kiu komencas kaj finas la pluvon. Se ni akceptas "daŭrigi" kiel taŭgan tradukon de "fortsätta", ni povas diri ekz. "post la morto de profesoro A. lia filo daŭrigis (fortsatte) la eldonadon de lia verko" aŭ "post la morto de profesoro A. la eldonado de lia verko estis daŭrigata (fortsattes) de lia filo". Sed por la netransitiva "fortsätta" ni ne havas ekvivalenton en Esperanto.

Kaj nun ni traktu la kernon de la demando. En la sveda ekz. "börja" havas unu formon, ĉu ĝi estas transitiva aŭ netransitiva, en Esperanto ni diras — aŭ almenaŭ devus diri, sed kiom de esperantistoj diras — "komenci" resp. "komenciĝi". Kompreneble tio estas manko en la sveda kaj avantaĝo en Esperanto. Sed konsekvence tio estas manko en Esperanto, ke ni ne havas ankaŭ por "fortsätta" du formojn, unu transitivan kaj unu netransitivan, analoge al fini—finiĝi, komenci—komenciĝi kaj multaj aliaj. Do, se ni havus radikojn — nederivitan — verbon transitivan por "fortsätta", ni povus bone formi la netransitivan verbon per "iĝ". Tiun mankon mi sentas.

Kaj nun fine, kial ne taŭgas "daŭrigi"? Nu, kion signifas "daŭri"? Ĝi signifas "esti plu", "resti neinterrompita", sekve "daŭrigi" signifas "igi (ion) resti neinterrompita". Sed ankaŭ en ĉi tiu rilato "fortsätta" havas du sencojn, kiujn la jenaj frazoj eble bone ilustras: "då jag kom in i rummet, fortsatte han att skriva utan att hälsa" kaj "då jag kom in i rummet, reste han sig, hälsade på mig och bad mig slå mig ned några minuter, och fortsatte sedan att skriva". En la unua frazo la skribado daŭras, restas neinterrompita. Tie ni do bone povas traduki "kiam mi venis en la ĉambron, li daŭrigis la skribadon sen saluto". Sed en la dua frazo li interrompis la skribadon kaj poste denove komencis skribi. Tie mi povas vidi nenian alian eblon ol traduki "fortsätta" per ekz. "rekomenci". Do "kiam mi venis en la ĉambron, li leviĝis, salutis min kaj petis min sidiĝi por kelkaj minutoj, kaj poste rekomencis la skribadon". Mi supozas ke Engholm subkonscie sentis tiun diferencon, kiam li tradukis "... tog myren vid" per "... komenciĝis la marĉo".

Ŝajnas al mi, kvazaŭ de nun mi estas devigita uzi "rekomenci" kaj "rekomenciĝi" por traduki "fortsätta" en ĉi tiu lasta senco, kvankam ili tute ne kontentigas min. Tamen "rekomenci" estas preferinda al "daŭrigi".

Birger Gerdman.

Eta libro KARLSKOGA URBO FARIĜANTA eldonita de Karlskoga Esperanto-Societo La Aglo, tre interesa legaĵo por vi mem kaj tre bona por sendi al viaj korespondantoj, estas aĉetebla por la malalta prezo de 1:— kr ĉe

Karlskoga Esperanto-Societo
Red. sekcio

Vindarnas väg 4 E, Bofors.

Kial estas la prezidanta palaco en Vaŝingtono nomita la Blanka domo.

Traduko de radioparolado en la "Monata Magazeno" de aprilo 1945 el Halmstad.

"Eĉ ne ĉiu en Usono naskita persono scias, kial la prezidanta palaco en la Usona ĉefurbo Vaŝingtono estas nomata "la Blanka domo". Ĝi devenas el la jaro 1814, kiam la angloj pere de unu certe ne tro impona armado de militŝipoj elŝipigis siajn soldatojn en Chisapeaks Beach ekstere de Baltimore en la ŝtato Marylando kaj de tie marŝis rekte al la Usona ĉefurbo Vaŝingtono. Estas rakontite ke okaze estis nur la edzino de la iama prezidanto, s:ino Madison, hejme, kaj ke ŝi pro ektimo eltranĉis la portreton de George Washington el la kadro kaj forkuris por kaŝi ĝin. Ŝajnas kvazaŭ la tutsola ekcesa malbonaĵo, kion la angloj ĉi foje faris, estis bruligi la prezidantan palacon, kaj de tiu momento ili trovis plej sekure por siaj vivoj forkuri al la ŝipoj kaj vojaĝi reen al la Malnova mondo.

La Usonanoj rekonstruis la detruitan palacon, enmetis novajn trabojn, ĉevronojn kaj tegmenton kaj fine pentris la nigrajn kaj fulgajn ŝtonmurojn blankaj. De tiu tempo oni nomas la palacon de l'prezidanto la Blanka domo.

Sed ĉar la lignaj traboj kontraŭstaris la denton de l'tempo jam dum pli ol cent jaroj, oni en la komenco de 1920 ektimis ke estas risko ke la trabaro iun tagon malsuprenfalos sur la kapon de la Usona prezidanto kaj sekve trovis necese renovigi la palacon de la fundamento.

Somere 1927 transloĝis la tiama prezidanto Calvin Coolidge al malnova palaco ĉe Connecticut avenuo, kaj ni ĉarpentistoj kaj aliaj metiistoj kun niaj iloj eniris en la Blankan domon.

Ni konstruis provizoran, grandegan, arkforman tegmenton de "Töreboda fasono" proksimume du metrojn super la malnova tegmento kaj do faris, kiel iu Vaŝingtona gazeto skribis, "ĉapelon sur la Blanka domo". Ni ĉarpentistoj nun malkonstruis la suban tegmenton kaj la plankojn kaj trabarojn en ambaŭ etaĝoj kaj tiel faris, kiel la bonaj Usonanoj tre ofte diras, "puran domon". Anstataŭ la forprenitaj trabaroj en du etaĝoj ni konstruis lignajn formojn, en kiuj poste estis fandita fera betono. Ne nur la trabaro kaj la planko sed ankaŭ la ĉevronoj samtempe kun suba tegmento sub la ardeza tegmento estis fandita el ferbetono. Novaĵo por mi estis izolecplato ĵus eksperimentita el maiza trunketo nomita Celotex. Ĉiu parto estis konstruita kiel antaŭe, kaj krome ni faris ĉambrojn por la prezidantaj gastoj en la tria etaĝo. La tutsola Skandinavo ĉi foje en la Blanka domo — estis mi."

Estas notinde, ke la raportisto en Halmstad, s:ro Frisk, kiu prezentadis min en la Radio, inter aliaj belaj vortoj ankaŭ diris: "La parolanto povas pruvi, ke li flue majstras esperanton kaj ke li ankaŭ korespondas kun ĉinoj, japanoj kaj rusoj esperantlingve."

J—s J—n.

Sezonfino en Uddevalla.

La infankursoj de Einar Dahl, konataj en la tuta lando, la 8-an de junio finis sian sezonon. Subskribinto volonte akceptis la inviton de la kursgvindanto kaj tiun de la infanklubo "Fajrero". Kaj jen raporto pri tiu interesa solenaĵo.

Kiam la publiko alvenis, 14 knabinetoj, ruĝaj pro la ekscito, sidis en la unuaj benkoj. Ili estas novulinoj en la esperanto-movado, ili studis esperanton dum 30 horoj dum la jaro, kaj nun ili devis respondi antaŭ la granda publiko. Sur ilia vizaĝo estis esprimita sento de streĉa atendo kaj granda respondeco. La knaboj, naŭ bravaj membroj de la "Fajrero" jam estis harditaj de pli fruaj publikaj aranĝoj kaj ili aspektis pli trankvilaj ĝis tiu momento, kiam ili eksciis, ke eksterlandano faros al ili demandojn. Tiam ankaŭ ilia mieno transformiĝis.

Granda publiko ĉeestis. Proksimume 40 eksteruloj. Unue sinjoro E. Dahl, la meritplena instruisto de la infankursoj salutis la ĉeestantojn kaj parolis pri esperanto en speciala kontakto kun la fakto, ke la konferenco en San Francisko ĵus akceptis ankaŭ la ĉinan lingvon inter la aliaj multaj, kreante atmosferon de vera Babelo. La knabinoj transdonis belan florbukedon al sia instruisto, kiu ne lasis sin subaĉeti per la donaco kaj bombardis la knabinetojn per rulfajro de demandoj. El la viglaj kaj klaraj respondoj oni informiĝis, ke la elefanto estas besto, ke ekzistas diverskoloraj hundoj, brunaj, grizaj, eĉ ruĝaj, ke la patrino estas bona, ke la benko estas flava kaj ke ĝi ne estas besto, sed meblo ktp. Per tiaj simplaj aferoj tamen ne finiĝis la admirinda cerba gimnastiko de tiuj etulinoj. Ili pruvis poste tute certan gramatikan scion kaj laŭ tio oni klare komprenis, ke tiuj ekslernantoj, pri kiuj s-ro Dahl pli frue rakontis, vizitantaj nun la praktikan mezlernejon, dank'al esperanto, estas inter la plej bonaj kaj plej lertaj lernantoj en aliaj lingvoj. Sonorvoĉa kanto kaj tondra aplaŭdo sekvis tiun parton de la ekzameno. S-ro Dahl ne estis malpli demandema, kiam la knaboj devis prezenti sian scion kaj la respondoj estis same klaraj kaj flue ditaj. Kaj kiam la fremdnacia gasto montris sin same maldiskreta, ankaŭ li ricevis bonegajn kaj detalajn respondojn. Du el la junaj esperantistoj estis eĉ tiel entreprenemaj, ke ili tradukis la dankparoladon de la gasto en la svedan lingvon kaj tiu faro estis despli laŭdinda, ĉar la interpretado funkciis tute glate kaj la tuta aranĝo estis tiarilate improvizita. Ke ankaŭ la knaboj ricevis tondran aplaŭdon, tio estas tute natura. — La ĉeestanta superinstruisto de la popollernejo, dankis la infanojn kaj ilian instruiston, kaj se la ĝisnunaj vortoj ne estus sufiĉaj por la konstato pri la eminenta pedagogia kapablo de la instruisto kaj pri lia granda, sindona laboro por tiuj kursoj, oni povus aldoni ankoraŭ multe da vortoj. Sed supozeble ili en si mem esprimas la laŭdojn.

Post la ekzameno kelkaj esperantistoj havis tre agrablan, ne oficialan renkonton en la hejmo de ges-roj Dahl.

F. Szilágyi.

Infana tago en Karlskoga.

Junulara sekcio de Karlskoga Esperanto-Societo La Aglidoj partoprenis en la karnavala trajno dum Infana Tago en Karlskoga, la 27-an de majo, kun tre bela kaj reklamiga vagono. La afero estis organizita plejparte de la junulara sekcio mem, kompreneble gvidita de la gepatra societo.

La esperanta vagono veturis kiel numero 1-a tuj post la vagonoj de la princino kaj ŝiaj junulinoj. Dekunu gejunuloj reprezentis ok naciojn kaj samtempe la nigran, flavan kaj blankan rasojn. La diversnaciaj homoj, kiuj ĉiuj kune kantis esperantajn kantojn, gaje ŝvingis la esperantajn flagetojn. La esperanta vagono estis multe atentata kaj aprobita de la publiko, kaj ĝi certe faris bonan efikon.

Karlskoga Esperanto-Societo
Red. sekcio

La esperanta vagono estas ĵus preta por preni sian lokon en la karnavala trajno. Sur tiu flanko oni povas legi: "Esperanto en ledstjärna för freden" kaj "Kloker är den som gör som jag, lär Esperanto varje dag". Flanke de la lasta frazo staras la koboldo Klokèr mem, tre bone pentrita de samideano Rune Ekmark.

La esperanto-vagono jam prenis sian lokon en la trajno. Sur la flanko de la vagono oni povas legi: "Esperanto la lingvo internacia" kaj malsupre "Freden förenar oss åter med Esperanto". Sur tiu flanko estas desegnitaj kelkaj internaciaj tipoj.

Proksimbildo de la esperanta vagono dum la veturo. Sur la bildo oni povas vidi plej antaŭe la ĉinon kaj malantaŭ li la hispanon. Kiel trian vi vidas arabvirinon en ruĝa vualo kaj kiel kvaran kaj kvinan la havajan knabinon kune kun la sveda knabino el Värmland. Kiel sesan vi vidas ankoraŭ unu ĉinon kaj de la alia flanko vi vidas ekvidetojn de negrino, amerika bovinknabo kaj tirharmoniko de la muzikisto.

La bildo montras la esperantan vagonon en la karnavala trajno. La trajno tre baldaŭ estas ĉe la celo, la sportejo de Bofors kaj amuzejo de Infana Tago.

La vagono nun trapasis 3 km kaj dum la tuta tempo same multe da publiko sur la vojflanko.

Niaj esperantojunulinoj ankaŭ estas kantistinoj. Sur la bildo ili staras sur sportejo antaŭ milkapa publiko kaj kantas. Oni povas vidi ke ili jam ricevis akompanantinojn, eble ili jam esperantigis ilin.



Redaktoro Paul Nylén en sia hejmo je la 75-jartago
20/6 45.



SEF Spalten

Sedan jag nu frånträtt befattningen som förbundets kassör, ber jag att på detta sätt få framföra sitt varma tack för visat förtroende. Tyvärr har jag inte, på grund av mitt förvärvsarbete, kunnat sköta mitt arbete som kassör så som jag skulle ha önskat.

I samband med överlämnandet av kassa och räkenskaper till den nye kassören, herr Bengt Skantz, för de flesta esperantister välkänd sedan sin tid på Förlagsföreningen, lämnar jag här en redovisning över de medel som influtit till Propaganda- och ombudsmannafonderna under tiden från föregående redovisning till utgången av maj månad d. å.

Propagandakassan.

Jonatan Lönn, Eksjö 24:—, Erik Ekström, Göteborg 5:—, G. Bengtsson, Kiruna 20:—, G. Bohm, Hemmestavik 3:—, Sollefteå Esp. klubb 42:—, Arne Harnell, Bengtsfors 10:—, Jacob Jacobsson, Nordmaling 4:50, Härnösands Esp. förening 10:—, . . s And . . Esperantujo 10:—, Carl Lindhagen, Ålsten 5:—.

Ombudsmannafonden.

K. J. Moberg, Ängby 10:—, Karl Björne, Lidingö 10:—, Mia Aspenström, Borlänge 10:—, Bjarne Beckman, Strängnäs 50:—, M. Thoraeus, Vaggeryd 10:—, Faringe Esp. klubb 5:— samt Tranås Esp. förening 5:—.

Med de förut redovisade efter den 1 okt 1944 influtna 5:— kr. uppgår fonden alltså till 105:— kr. Detta belopp fonderas enl. årsmötets beslut tills frågan om en ombudsman på nytt kan bliva aktuell.

Frihetsgåvan till Norge.

Vid SEF:s årsmöte under pingsten insamlades 165:— kr. såsom frihetsgåva till Norge med personlig hälsning till Norsk Esperanto-Forbund.

Birger Gerdman.

Amikaro de SEF.

La estraro nun elsendis cirkuleron al ĉiuj kluboj kaj rektaj membroj pri aliĝo al AMIKARO DE SEF. Jam 40-o da aktivuloj montris sian helpemon kaj resendis la aliĝilon subskribita. Kelkaj kluboj informis nin ke estas neeble trovi samideanon en ilia loko, kiu povos pagi tiel grandan kotizon kiel 60:— kronoj pojare. Tion ni antaŭvidis kaj bone komprenas, sed volas samtempe menci, ke multaj kluboj solvis la problemon tiel, ke kelkaj aŭ ĉiuj membroj komune respondos pri unu kotizo. Tial ni denove petas ĉiujn klubojn esplori la eblecojn tiurilate — 16—17 oeroj potage dum unu jaro faras unu kotizon!

La unua listo pri la membroj de AMIKARO DE SEF venos en la sekvonta numero de La Espero. Ĉu ni trovos vian nomon aŭ klubon en ĝi? Por kiu celo SEF uzos la monon de sia AMIKARO?

Jen, kelkaj ekzemploj:
 Novaj propagandofolioj
 Novaj allogaj afiŝoj
 Novaj flugantaj ekspozicioj

Nova ekzemplero de la programarkivo
 Studhelpilo por daŭrigaj kursoj

Aranĝo de centro por kontrolo de partoprenantoj en la korespondkurso kaj propagando inter ili pri aliĝo al la esperantomovado

Pretigo de konsulta librejo ĉe SEF por esperantostudentoj

Pretigo de nia arkivo

Plibonigo de la teknika ekipado de nia sekretariejo

k t p, k t p, k t p

Ĉio signifas ke ni — se ni havos la necesan monon — baldaŭ povos fari vere efikan laboron kaj doni al la kluboj ĉian helpon rilate propagandon, kursojn kaj membroflegadon.

Esperanto-veckan 16—23 septembro 1945.

Anstataŭ "Verda semajno" ni de nun nomas la aŭtunan propagandotagojn ESPERANTO-VECKAN. Tio nur por ke la granda publiko pli bone komprenu la signifon de la tutlanda samtempe okazanta manifestado de Esperanto. SEF intencas dum tiu semajno anonci la korespondkurson en kelkaj semajnaj gazetoj kun grandaj eldonkvantoj. Samtempe la kluboj anoncu en la lokaj gazetoj kaj provu enigi artikolon pri esperanto, aranĝu ekspozicion kaj prelegon — do, malmultvorte, faru ĉian eblan propagandon. Tiel vi povas esti certaj ke la homoj en la tuta lando rimarkas ke ni vivas, kaj vidante la multan propagandon ili komprenos ke nia lingvo denove floras kaj indas lerni.

Ju pli da kursanoj, des pli da novaj membroj — ju pli da membroj, des pli da kotizoj kaj vendotaj libroj — ju pli bona ekonomio, des pli facila la venko!

"Literatura konkurso".

Verku artikolon — aŭ pluraj — pri la utilo kaj plezuro scipovi esperanton. Ni bezonas multajn artikolojn por ke ĉiu gazeto — se eble — ricevu sian propran por publikigo dum ESPERANTO-VECKAN. Por stimuli la verkemon ni disdonos 5 libropremiojn al la plej bonaj verkintoj. La artikolo ne devas esti longa sed des pli interesa kaj leginda. Eble multaj el vi jam havas tiajn, kiuj aperis en via loka gazeto kaj kiujn ni nun povus doni al alia gazeto en alia parto de la lando — serĉu aŭ verku tuj, ĉar la artikoloj devas esti ĉe SEF plej malfrue la 15-an de aŭgusto.

Cirkuleron

kun proponoj pri efikaj aranĝoj rilate propagandon ni sendos al ĉiuj kluboj kaj rektaj membroj en bona tempo antaŭ ESPERANTO-VECKAN. Se vi havas bonan ideon, kiun aliaj kluboj povus uzi, skribu kelkajn vortojn pri ĝi sur poŝtkarto kaj sendu ĝin tuj al SEF. Tiel ĜUSTE VI povas helpi nin servi plej efike al vi ĉiuj.

Fine eta peto: Provu ĉiam tuj respondi je niaj cirkuleroj kaj leteroj.

La Espero 1925 kaj 1937.

Por nia arkivo ni bezonas 2 jarkolektojn de Sveda Esperanto Gazeto de 1937. La sekretario estus ankaŭ tre danko se li ie trovus numeron 8 de 1925, kiu mankas en lia cetere plena kolekto. Kiu volas vendi aŭ donaci?

SAM.

Karlstad. Esp. Societo. Plej ĝojiga en la esperantovivo tie ĉi lastatempe estas la starigo de esperantogrupo en la kadro de "libertempa okupado" popollerneja. Jam aŭtune la klubo decidis donaci premiojn al la plej diligentaj gelernantoj, kaj ĉe la solena finfesto. Dum ĉeesto de 300 infanoj kaj kelkaj gepatroj, la popollerneja inspektoro Rydborg povis disdoni kiel premiojn 5 "Dubbel fickordbok", 3 "Parlör" krom 5 malgrandaj "konsolaĵoj", dirante al ĉiu gelernanto esperantlingve: "Mi gratulas", kiujn vortojn li momenton antaŭe eklernis. — La popollerneja estraro per protokol-elтираĵo la 8/5, § 90, eldiris sian "varman dankon" al la esp.-klubo.

Ni recenzas.

Naŭa jarraporto de J. E. Ohlsens Enkes Plan-tepatologiske Laboratorium ĵus venis en nian manon. Kiel ĉiam tiu jarlibro de la konata dana agrikultura laboratorio enhavas post la dana teksto resumon en angla kaj esperanta lingvoj, tre valoran por la fakuloj.

Irlando vokas sendis la junian numeron de sia Gestetenere presita flugfolion sub la moto: Konigi Irlandon al tutmondo. La Ĉefartikolo enhavas la sciigon de sro De Valera en la irlanda parlamento pri la pretigo de helpsendadon al suferantaj eŭropaj popoloj je valoro de 14 milj. de usonaj dolaroj. "Mi faras la oferon publike, diris sro De Valera, por ke la landoj, kiuj deziras helpon, sciu kion ni povas oferi por ke oni komuniku kun ni kaj helpu nin obteni transportilon — kio estas la ĉefa malfacilaĵo."

Interesitoj povas sendi unu respondkuponon al L OhUigiann, Sonas, cnoc na hinneona Dundroma Dublin, Irlando. Li sendos venontan numeron de la folio.

La esperantista studrondo, kajero de 24 paĝoj, enhavas konsilojn por studgvidantoj. La verkisto estas Alf Hasle, kaj la eldonanto estas Norvega Esperantista Ligo. Prezo 0,40 norv. kr.

Dansk Esperantoblad, eldonata de Centra Dana Esperantista Ligo komencas sian junian numeron per artikolo de la liga prezidanto sro O. C. Lange, kiu sub la titolo "Freden" dankas por la paco sed atentigas pri la malfacilaĵoj, kiuj restas. Inter tiaj li nomas la poŝtajn malhelpojn je internacia kontakto. Esperanto ne estas permesata lingvo en letero ne al, nek de Danlando. Krome postajoj ankoraŭ ne povas iri trans la demarka linio inter soveta kaj okcidentpovaj okupacioj de Mezeŭropo. Oriente de tiu linio ja sin trovas la plej granda bezono de internacia lingvo.

Sonu, kanto, sonu, kantlibro, eldonita de Esperanto-Instituto de Finnlando, por la uzo ĉe kursoj kaj esperantistaj kunvenoj kaj festoj, precipe ankaŭ por la somera kurso kaj tendaro en Punka-

harju. La plejparto de la kantoj estas antaŭe nepublikigitaj tradukoj de finnaj popolkantoj kaj aliaj por ĉiu kantema finno konataj kantoj. Inter la tradukistoj la plej diligenta estis profesoro G. J. Ramstedt, la fama filologo kaj antaŭa ministro de Finnlando en Tokio.

La verda folio estas hektografita 12-paĝa kajero, kiu nomas sin La oficiala organo de La monda ligo de naturamantoj. Ĉar la sola poŝtservado estas aera, la abono por Svedujo estas 6 ŝilingoj por 12 ekz.

Korespondado.

Korespondadreso: Sro C. Gass, The Grammar School, Hemsworth Nr Pontefract (Yorks) England — Ĉefperanto por Tutmonda Junularorganizo.

Korespondado. 31-jara franco, fraŭlo, estinta en Germanlando, deziras korespondi. Adr: Jean Boyer, Hopital mil. de la C.R.F., Villiers sur Marne par Charly Aisne, France.

Korespondo-Servo havigos al vi francan Korespondanton. Vin turnu rekte al perantino: fino Jeanne Dedieu, 23 rue Victor Hugo, Prades. Pyr. or. **Francujo.** Vin mem detale priskribu (aĝo, metio, esp:a kulturo, familia situacio, ĉefaj intereso, elektitaj temoj, ktp). Ankaŭ pri la petito iom parolu. Sed memoru ke "ĝuste laŭmezura k:anto" estas malfacile trovebla. Menciuj, ĉu vi permesas al la perantino ian liberon kaj anstataŭigon de iuj kondiĉoj.

Korespondado.

En nia gazeto estas Esperanta kolono, inter la enhavo estas kurso de nia lingvo.

La lernantoj deziras korespondi kun eksterlandaj geamikoj. Se vi deziras korespondi kun sveda esperantisto, sciigu vian deziron al ni, prefere enmetu anonceton.

Se vi baldau skribos, vi ricevos anonceton senpage.

Ni estas dankemaj, se viaj leteroj estas filatelie frankitaj.

Ni bonvene atendas kelkajn liniojn.

Se vi tion deziras, ni senpage sendos specimenon de nia gazeto.

Kun altestimaj salutoj
Gazeto CYKELBILISTEN.
Landskrona, Svedio.

Anders Rosenberg †.

Mortis en Skara 30.V. Anders Rosenberg 84-jara. Naskita en Skanio, li faris siajn ekzamenojn de studento k de popolinstruisto en Linköping. Pro malsano de la filo li ekstudis medicinon kaj naturkuracajn metodojn, praktikante poste siajn kuracprincipojn en Varnhem kaj en Skara. Tie li loĝis en 1917, kiam SEF jarkongresis en tiu urbo. Rosenberg kunlaboris kun Backman por la Skandinava Kongreso i Gotenburgo 1918, kies kasisto li estis. Rosenberg estis interesa persono kaj bona esperantisto; aminda homo, kies memoron konservas multaj amikoj. **N.**

Med detta nummer

följer en bilaga om Folke Bernadottes succébok "SLUTET", vilken inom närmaste tiden utkommer på esperanto. Samtidigt följer även anmälningsblankett för den nya bokklubben. Studera prospektet och beakta dess vikt. Låt oss snarast få Eder anmälan.

polyglott

lingva kaj skriba servo
pokalv. 4 stockholm tel. 44 44 00

tradukoj en ĉiuj kulturlingvoj fare de indiĝenoj kompetentaj pri sciencoj inĝenieraj, jura, medicina kaj ceteraj fakoj.

lernohelpo per korespondado! pedagoga korektado de stilekzercoj en germana, angla, franca, rusa, hispana, greka, latina.

multigrafado de ĉiu speco. moderna leter-reklamo, kovertskribado, distribuo, artaj kaj personaj posedmarkoj, plaĉaj vizitkartoj!

lingvokursoj laŭ rekta metodo. konversaciaj rondoj kun ununure eksterlandaj instruistoj. aliĝu tuj! petu nian prospekton!

ESPERANTOBLADET —

de norska esperantisternas organ —

börjar ånyo utkomma med september månad. Första numret kommer att ägnas de gångna krigsåren och innehålla minnesartiklar över fallna norska esperantister. I övrigt utlovas att tidningen skall bli innehållsrik och intressant så att den även kan intressera svenska läsare.

Svenska esperantister.

Hjälp de norska esperantisterna att komma igång. Prenumerera på deras tidning. Den har alltid varit läsvärd — vi tror den blir det i än högre grad härefter.

Pris till årets slut 1 kr. Abonnemang tills vidare endast hos

Förlagsföreningen Esperanto
Fack 19071 Stockholm 19 Postgiro 578

Svenska Esperanto-Tidningen

La Espero

Organ för Svenska Esperanto-Förbundet

Postadr.: Postfack 19071, Stockholm 19.

Redaktör: Eva Julin, Nytorngatan 15, 4 tr. ög., Sthlm.

Ansvarig utgivare: W. Wahlund.

Prenumerationspris: helt år kr. 4:— . Lösnummer 0:35.
Utkommer en gång i månaden.

Annonspris: 20 öre pr mm. Korrespondensannonser: 1:50.

Expedition: Förlagsföreningen Esperanto, Sveavägen 98, Stockholm. Tel. 31 65 01. Postgiro 578.

SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET (Sveda Esperanto-Federacio), Tegelbacken, Stockholm C. Tel. 20 00 43. Postgiro 20 12.

Avgifter: Direkt ansluten medlem erlägger 7:50 kr. pr år och erhåller tidningen gratis. Familjemedlem, som ej erhåller tidning, erlägger 4:— kr. pr år. Förening med kollektiv prenumeration å tidningen för sina medlemmar erlägger för varje medlem en årlig avgift av 5:— kr. För familjemedlem är årsavgiften 2:— kr. Förening, som ej prenumererar kollektivt å tidningen, erlägger för varje medlem 2:— kr. pr år. Varje ansluten förening erhåller ett exemplar av tidningen gratis.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO u. p. a., postadress: Box 19071, Stockholm. (Expedition: Sveavägen 98.) Tel. 31 65 01. (Förlagschefen: 30 75 15.) Postgiro: 578. (Böcker, tidningar, korrespondenskurser o. s. v.)

SVENSKA ESPERANTO-INSTITUTET, Tegelbacken, Stockholm. Postgiro 5 15 11.

INTERNACIA ESPERANTO LIGO — IEL (Sveda Teritorio): Chefdelegito Karl Wästfelt, Cedergrensvägen 27, Stockholm 32. Poshtcheka konto 15 12 88. Kotizoj: Membro kun jarlibro kr. 3:—; Membro-Abonanto 8:—; Membro-Subtenanto 20:—; Patrono 80:—.

Varje klubb

bör för sina sammanträden och festligheter ha ett vackert bordsstandar.

Varje medlem

sätter värde på att vid bemärkelsedagar uppvaktas med ett dylikt.

Vårt nya högeleganta standar av prima siden och försett med guldsnodd och dito tofsar har vunnit allmänt gillande och kostar inkl. oms. och porto kr. 13.50. Önskas stång (vitmetall) tillkommer kr. 7:—. Storlek 15×24 cm.

Förlagsföreningen Esperanto

Fack 19071, Stockholm 19.

Postgiro 578

Y TONG

La malvarma norda klimato necesigas varmizolajn ekstermurojn. Ordinara konstrumaterialo tial estis ligno, speciale en kamparo kaj urbetoj. La lignaj konstruaĵoj tamen kaŭzis multajn brulakcidentojn.

Dank al la sveda invento "Ytong" oni nun je modera kosto povas konstrui brulreziste sed varme en malvarma klimato. Ytong estas poroza betono, tiel malpeza ke ĝi povas naĝi sur akvo, sed tamen fortika.

Svedlingva broŝuro havebla senkoste.

YXHULTS STENHUGGERI A.B.
Hällabrottet